

5/2019

Septembro  
Oktobro

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ **Forpasis Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof**
- ★ **Finnlando - Esperanta kongreso, lagoj, arboj kaj...**
- ★ **La forgesita esperantisto dormas en trankvilo**

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodzo@wp.pl](mailto:rk-lodzo@wp.pl)

## **Kunlaboro**

Teresa Nemere, Magdalena Tatara,  
Adam Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2020 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj

Cifereca (pdf)

Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per  
Konto de PEA en UEA: [peaa-v](mailto:peaa-v);

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>  
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

## **Estraro de PEA**

Robert Kamiński - prezidanto  
Agnieszka Mozer - vicprezidanto  
Zofia Śmistek- sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Represo kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Eventoj</b>	
<i>Irena Tomaszewska</i> , „Nacia legado en Szczecin” .....	3
<i>Agnieszka Będkowska</i> , Eperanto en Vojevodio Biblioteko en Kraków .....	3
<i>Halina Komar</i> , Esperanto en la muzikfestivalo Pol'and'Rock .....	4
<i>Robert Kamiński</i> , Prelego en la Pedagogia Biblioteko .....	6
<i>Marc Cuffez</i> , Esperanto sur la Strando .....	7
<i>Tatara Magdalena</i> , Esperanto ĉe polaj futbalistoj .....	10
<b>Mojose</b>	
<i>www.pej.pl</i> , Internacia Junulara Kongreso en 2019 en Slovakio .....	11
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Krystyna Zgud</i> , Finnlando - Esperanta kongreso, lagoj, arbaroj kaj... ..	12
<i>Krzysztof Blinkiewicz</i> , La forgesita esperantisto dormas en trankvilo .....	16
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , <i>Feliks Wandervogel</i> , La unua Esperanta turneo .....	19
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
Reveno al la „Arĝenta Globo” - ĝi ŝajnas esti interesa kaj realigebla .....	22
<i>GeekWeek.pl</i> , Mirinda vojaĝo trans la Norda Poluso per la plej granda aerŝipo .....	23
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Weronika Skupin</i> , Parkoj de Stela Ĉielo .....	25
<b>Homoj</b>	
Gazetaraj Komunikoj de UEA, Forpasis Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof .....	27
<i>Roman Dobrzyński</i> , Rememore pri Ludoviko K. Zaleski-Zamenhof .....	30
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , Posedaj pronomoj .....	34
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Mark Twain</i> , „La homo” .....	35
<b>Leterkesto</b>	
Mi nomiĝas Luis Rafael... ..	37
<b>Kalendaro</b>	30
<b>Oni eldonis</b>	
„Ok noveloj”, „La Saĥemo”, „Pri ETIK-IDEOJ DE L.L. ZAMENHOF” .....	40
<i>Robert Kamiński</i> , Pri internacia lingvo en scienca bulteno .....	41
<i>Robert Kamiński</i> , Nova esperantlingva turisma prospekto .....	42
<b>Gazetaro pri E-movado</b>	
„Dziennik Bałtycki” 15.09.2019, „Życie Kalisza” 8.11.2019 .....	43
<b>Forpasis</b>	
Ludwik Krzysztof Zaleski-Zamenhof, Irena Łowińska .....	44
<b>El fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki</i> , La 6-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo 11-13.12.1987 .....	44

### Estimataj legantoj

Jen antaŭ vi, la ĉi-jara kvina numero de Pola Esperantisto. Bedaŭrinde ĉeftemo de la numero estas forpaso de Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof, la plej proksima familiano de L.L. Zamenhof. Lia forpaso estas grandega perdo por Esperanto-movado. L.K. Zaleski-Zamenhof estis merita homo kaj bonega esperantisto ĉiam fiera de sia estimata avo. Preskaŭ ĉiuj Esperantistoj lin konis kaj estimis. Li aktive partoprenis en esperantista movado ĝis naŭdekaj jaroj de sia vivo. Multfoje oni povas vidi lin dum la Universalaj Kongresoj kaj aliaj esperantistaj kunvenoj. Mi ekkonis L.K. Zaleski-Zamenhof iom hazarde dum solenaĵo en “Parko de la Mondo” en Malbork la 10-an de septembro 2002 okaze de malkovro de ŝtono kaj planto de arbo „Francio”. Tie mi havas honoron donaci lin mian tiam ankoraŭ modestan informilon pri polaj Zamenhof/Esperanto-Objektoj kaj iom interparoli. Printempe de 2019 mi kunlaboris kun Roman Dobrzyński ĉe dulingva (esperanta kaj pola) eldono de biografia skizo pri L.K. Zaleski-Zamenhof sub titolo „Avo kiu estas nepo”. „La nepo” ricevis ambaŭ ekzemplerojn senditaj de Roman Dobrzyński. Doktoro, inĝeniero L.K. Zaleski-Zamenhof pro malbona sanstato post la jubilea Universala Kongreso en Lilo jam ne partoprenis en esperantista movado. Li mortis en Parizo kaj tie etis entombigita. Jam antaŭ kelkaj jaroj la taskon de reprezentado de Zamenhof-familio en E-movado li transdonis al sia filino Margerita. En la numero de PE vi povas legi komunikon de UEA pri la forpaso kaj rememoron de Roman Dobrzyński pri sia amikeco kun Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof.

Mi invitas al legado de interesaj travivaĵoj de Krystyna Zgud pri Finnlando. Mi aparte rekomendas artikolon de Krzysztof Blinkiewicz, kiu priskribas vere unikan historion de juna esperantisto el urbo Płock.

*Robert Kamiński*



*Irena Tomaszewska*

### „Nacia legado en Szczecin”

La 7-an de septembro, esperantistoj el Szczecin partoprenis denove en la "Nacia Legado", kiun organizis la Pomerania Librejo en Szczecin. El la proponitaj al legado noveloj, ni elektis fragmenton el „*La gurdo*” (“*Katarynka*”) de Bolesław Prus, tradukita de nia amiko Krzysztof Łobacz. Legis Janina Borowiecka kaj Irena Tomaszewska.



Post mallonga enkonduko pri Esperanto, ni legis alterne en la pola kaj en Esperanto, por alproksimigi la signifon de ĉiu vorto al la publiko. Ni inventis tion pasintjare, dum legado de "*Antaŭprintempo*" (“*Przedwiośnie*”) de Stefan Żeromski. Tio plaĉis al la publiko, kiu estis surprizita, kiom da vortoj oni povas rekonii kaj kompreni.

Ĉeestis membroj de nia klubo. Teledajaj ĵurnalistoj intervjuis nin pri Esperanto, nia movado kaj nia kunlaboro kun la biblioteko.

*Agnieszka Będkowska*  
Tradukis *Robert Kamiński*

### Esperanto en la Vojevodio Biblioteko en Kraków

La Vojevodio Publika Biblioteko en Krakovo, kune kun la Studenta Scienca Esperantista Rondo de la Jagiellona Universitato, invitis ĉiujn al kunveno kiel parto de la „Nacia Legado 2019”. La kunveno okazis en la ĉambro 232, en la dua etaĝo de la Vojevidio Biblioteko en Kraków, ĉe la str. Rajska, la 7-an de septembro 2019.

Partoprenantoj de la kunveno en la Biblioteko legis elektitajn novelojn ne nur en la pola, sed ankaŭ en Esperanto. En la legado partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la Fundamenta Lernejo el Zagórník (apud Andrychów), kies patrono estas Ludwik Zamenhof.

La lernejo venontjare festos la 30-an datrevenon de ricevo de la patrono.

Samtempe okazis ankaŭ la reklamprezento de la unua eldono de la novelo "Sachem" en Esperanto ("La Saĥemo", 2019) de Henryk Sienkiewicz kaj renkontiĝo kun la tradukistino - Maria Majerczak kaj la aŭtorino de la kovrilo - Barbara Jeziorek.

---

*Halina Komar*

## Esperanto en la muzikfestivalo Pol'and'Rock

La kvara **Multkultura Vilaĝo Esperanto** estis aranĝita, komence de aŭgusto, dum la grandega, jam 25-a (jubilea), muzikfestivalo „Pol'and Rock” en Kostrzyn ĉe Odrow, kie estis neimageble amasa publiko – ĉirkaŭ 800 mil ĉeestantoj – kaj dum la grandaj koncertoj – ĝis miliono!

Kiel kutime, la teknikajn kondiĉojn de **Multkultura Vilaĝo Esperanto** prizorgis la amikoj el Vroclavo: Michał Sidorowicz kaj Patryk Zadka. La tasko de CEM (Centro de Interkultura Edukado Nowy Sącz – Wrocław) estis strebo kolekti necesan monon kaj organizi la ĝustan laborteamon, prepari necesan stokon de informiloj, flugfolioj kaj broŝuroj.

**Multkultura Vilaĝo Esperanto** estis denove situata rekte antaŭ la ĉefa enirejo al la sidejo de la festivalaj organizantoj el ASP (Akademio de Belartoj). Por rezervi tian prestiĝan lokon, la kolegoj el Wrocław venis tien jam du tagojn pli frue.

Pol'and'rock-festivalo probable estas la sola tiom granda festivalo. Ĝi estas tute senpaga, ĉar estas organizata de la karitata fondaĵo, kiel danko pro la volontula laboro de cent miloj da junaj homoj en Pollando, Eŭropo kaj sur aliaj kontinentoj. La celo de la agado estas kolekti monon por aĉeti hospitalan aparataron enkadre de la vintra kampanjo de WOŚP (La Granda Orkestro de la Festa Helpo).

Tial la festivalo estas ne nur amuziĝo, sed ankaŭ kunesto de tre valora junularo, entuziasme kaj volontule laboranta dum vintro por noblaj, homhelpaj celoj.

En Kostrzyn ĉe Odrow, ĉe la pola-germana landlimo, nur 100 km de Berlino, amuziĝis amike kaj gaje centmiloj da junaj homoj, laŭ la festivala alvoko: "Amikeco-Amo-Muziko". Regis tie grandioza etoso – neimagebla ĝojo pro kunesto de tiom granda junulara amaso.

En la programo de **Multkultura Vilaĝo Esperanto** furoris Esperanto-lecionoj de Stano Marĉek (3 unuhoraj kursoj por komencantoj antaŭtagmeze kaj 3 unuhoraj kursoj posttagmeze) kaj prelegoj de Kamil Dudkowski pri malmultekosta vojaĝado/vagado tra la mondo. Tre alloga estis la programero "Five o'clock" kun interesaj diskutoj, allogantaj plenan tendon da gastoj kun filozofia interesiĝo. Estis ĝojige kaj interese, ke ni atingis propran publikon de inteligentaj, diskutemaj homoj. Nia "Vilaĝo Esperanto" jam estas konata kaj traktata kiel agrabla, gastama loko. Revenadas al ni gastoj de la pasintjaraj aranĝoj.



Por la estonto ni kreis laborgrupon el esperantistoj en Nowy Sącz, Varsovio kaj Wrocław. La "ŝlosilojn" mi nun disponigas, pro miaj aĝo kaj sanproblemoj, al Ata (Małgorzata Kaczanowska), kiu fariĝos anstataŭ mi "vilaĝa dommastrino". Aliaj homoj, por gvidi la programon estas: Stano Marĉek - respondeculo pri Esperanto-kursoj, Kamil Dudkowski - diversstemaj prelegoj, Lidia Komar, Patrycja Barwińska, Eliza Gładyś, Zuza Kornicka, Ata – servado kaj informado ĉe standoj. El Varsovio ni havas tre entuziasmajn kaj laboremajn: Kamil Getka kaj Maria Sułkowska. Ili deĵoras, fotas, informas, aĉetadas, ordigas... Koran dankon kaj pluajn sukcesojn al ĉiuj!



*Robert Kamiński*

## Prelego en la Pedagogia Biblioteko

La 30-an de septembro 2019, la Filio de Pola Esperanto Asocio en Siedlce, kunlabore kun Pedagogia Biblioteko en Siedlce, prezentis prelegon pri la internacia lingvo kaj Esperanto-movado. Prelegis Robert Kamiński kaj Agnieszka Baczkura. Al la granda salono de la biblioteko, krom esperantistoj kaj bibliotekistinoj, venis klaso de lernantoj de la proksima liceo. Preskaŭ ĉiuj lernantoj unuan fojon aŭdis pri la internacia lingvo kaj la nomo Esperanto estis por ili tute nekonata. Tiu ĉi sperto montras, ke esperantistoj devas agi ekster la movado kaj vaste informi, precipe junularon, pri ekzisto de Esperanto. Juna generacio neniam aŭdis pri Esperanto. Informado estas unua ŝtupo por la eventuala invito al lernado de la lingvo.







*Marc Cuffez*

## Esperanto sur la Strando

Jam la sepan fojon, la Esperanto-klubo "Torento" el Sopot organizis la Esperanto-renkontiĝon "Esperanto sur la Strando" ĉijare, de la 12-a ĝis la 15-a de septembro. Mi partoprenis ĝin unuafoje.

Mi alvenis al Gdańsk la 10-an de septembro kaj tranoktis en iu apartamenta ĉambro en Gdańsk. Antaŭ la renkontiĝo mi vizitis Westerplatte kaj Wejherowo.



La 12-an, je la 17-a horo, ni ĉiuj kunvenis en la klubejo de la Esperanto-grupo „Torento” en Sopot. Vespere, ni vizitis restoracion, ĉe la strando de Sopot, kie eblis vespermanĝi kaj trinki.

La 13-an ni komencis la tagon per vizito de la Katedralo en Gdańsk-Oliwa. Poste ni iris al la

Etnografia Muzeo, kie okazis la oficiala inaŭguro de la aranĝo kaj prelegoj pri la lingvo kaj kulturo de la proksimaj regionoj: Kaszuby kaj Kociewie. Poste, per tramo, ni vojaĝis al la centro de Gdańsk, kie ni tagmanĝis en bela restoracio, povante elekti regionajn manĝaĵojn. Post la tagmanĝo, okazis urbo-ludo tra la malnova Gdańsk. Dividitaj je 2-3 personaj grupetoj ni serĉis priskribitajn sur specialaj enketiloj interesajn historiajn objektojn kaj ni strebis respondi demandojn, kunligitaj kun ili. Unu el la demandoj eĉ estis pri flandroj, kiuj venis al Gdańsk en la 16-a jarcento. Ĉar restis ankoraŭ libera tempo, ni promenis ankaŭ al la nova muzeo de Solidarność, kie per lifto ni povis atingi la 6-an etaĝon kaj rigardi la belan vidon al la haveno de Gdańsk.



La 14-an estis la tago en Sopot. Je la 10:30 ni kolektiĝis ĉe la klubejo Toronto, kie ni ricevis „E-ĉapelojn” kaj kelkajn aliajn E-reklamilojn kaj poste, en la centro de la urbo, ni aliĝis al la parado de la urbaj, neregistaraj organizaĵoj. Je la fino de la parado, kune kun kaŝuboj, ni kantis kaj en Esperanto kaj en la kaŝuba lingvo la kanton "Kaŝuba arbaro, kaŝuba lag'..."

Posttagmeze, je la 16-a horo, Paulo Hopkins el Victoria, (Kanado) prelegis pri la kaŝuba lingvo. Li rakontis, ke li unue volis studi la luksemburgan lingvon, sed, kiam li renkontis sian edzinon en Varsovio en

1987, li komencis studi la kaŝuban lingvon kaj poste ankaŭ doktoriĝis pri ĝi. Meritas aldoni, ke la prelego okazis en la bela, malnova palaceto – nun la sidejo de Societo de Sopot Amikoj.



Vespere, kolektiĝine denove en la klubejo, ni kantis kaj babilis.

La 15-an ni faris ekskurson trajne al Pelplin. Tie estas bela katedralo, bedaŭrinde nun fermita pro renoviglaboroj, kaj okazis Cisterciana Foiro kun parado. Ni vizitis ĝin kaj poste iris al la Dioceza Muzeo, kie troviĝas sola en Pollando, unu el la dek konservitaj unuaj biblioj de Gutenberg.

Je la 13:30, en la regiona restoracio, okazis bela koncerto de la infana popola ensemblo „Modraki” el Pelplin. Poste, denove oni regalis nin tie per la regionaj, bongustaj manĝaĵoj, tiom abunde, ke ĉiuj kunportis parton hejmen. Je la 17-a ni forveturis denove per trajno al Gdańsk.

Mi ankoraŭ restis unu plenan tagon en Gdańsk, do estis sufiĉe da tempo, por ankoraŭfoje viziti la centron de la urbo kaj butikumi en la belaj vendejoj apud la malnova urbocentro.

La 17-an mi reflugis al Eindhoven en Nederlando, de kie mi vojaĝis buse kaj trajne al mia hejmo en Oostende, Flandrio (Belgio).

Mi tre ĝojis pro la renkontiĝo kaj eble iam mi partoprenos en ĝi ankoraŭfoje, aŭ mi vizitos alian renkontiĝon en Pollando.



*Tatara Magdalena*

## Esperanto ĉe polaj futbalistoj

Dimanĉe, la 13-an de oktobro 2019, la pola nacia teamo de futbalo ludis matĉon kontraŭ teamo de Norda Makedonio, kadre de kvalifikoj al la eŭropa ĉampionado de futbalo (Eŭro), kiu okazos en 2020. Poloj gajnis 2 - 0 kaj dank'al tio ili jam certigis sian partoprenon en la aranĝo. Okaze de tiu sukceso, la Pola Asocio de Futbalo preparis specialajn toĉemizojn por la ludantoj. Sur la dorsa flanko estas skribita frazo en Esperanto "Tria avanco". La Esperanta surskribo montras la internacian karakteron de la turniro EURO 2020, kiu okazos en 12 eŭropaj landoj. Tio estas novaĵo, ĉar ĝis nun tiu turniro okazadis nur en unu aŭ du landoj.

La frazo "tria avanco" signifas ankaŭ, ke la pola teamo jam trian fojon sinsekve sukcesis kvalifikiĝi al la grava, futbalista evento. Antaŭe, poloj partoprenis en Eŭro 2016 en Francio kaj en la mondĉampionado en 2018 en Rusio. Okaze de tiuj avancoj estis preparitaj ankaŭ



specialaj toĉemizoj kun surskriboj en la franca kaj la rusa lingvoj.

Ĉiuj sportaj retejoj informis, ke nekutima surskribo estas en la internacia lingvo Esperanto kaj en kelkaj frazoj priskribis historion de la lingvo kaj ĝian kreinton. Tiu ĉi surpriza evento fariĝis granda reklamo de Esperanto. Amaso da futbalŝatantoj interesiĝas pri futbalaj sukcesoj de la pola teamo. Pola Esperanto-Asocio sendis leteron kun gratuloj kaj dankoj al Zbigniew Boniek, prezidanto de Pola Asocio de Futbalo.

## Mojose

*www.pej.pl*

### Internacia Junulara Kongreso en 2019 en Slovakio

IJK-2019 en Slovakio estis mojosa semajno de amuziĝo, amikeco, muziko kaj lernado. 231 homoj el 35 landoj kunvenis en la koro de Eŭropo danke al Esperanto. Gratulojn al la organiza teamo por la mirinda laboro! Kaj dankon al ĉiuj partoprenintoj!

Se vi maltrafis la slovakon IJK-n ĉijare, rigardu almenaŭ la belegan albumon, plena de ĝojo kaj koloroj! Ni senpacienca renkonti vin ĉiujn denove, post unu jaro, en Nederlando ! Kaj dume, por ne tro sopiri, ni rekomendas aliĝi al nia vintra evento JES. Vizitu nian paĝon <http://jes.pej.pl/eo/>



Krystyna Zgud

## Finnlando - Esperanta kongreso, lagoj, arbaroj kaj muziko de Sibelius

Ĉi-jara UK okazis en Finnlando, en Lahtio. Tiun ĉi urbon preskaŭ ĉiuj konas pro sportaj konkuroj en skisaltado, sed eble ne ĉiuj scias, ke Lahtio estas elektita Eŭropa Verda Ĉefurbo por la jaro 2021. En iu bela, verda suburba kvartalo de Lahtio, oni konstruis grandan sportan centron. Tie troviĝas skisaltejoj, atletika stadiono kaj hokea halo, nomita *Isku Areena*. Ĝuste tiu ĉi halo estis nia kongresejo. Pri la kongreso mem certe skribos iu alia kaj mi volas prezenti miajn impresojn pri la lando.

Finnlando salutis min tre bele, per la bunta, belega, ĉielarko, videbla sur la tuta firmamento. En tiu momento mi jam sciis, ke mia vojaĝo al Finnlando estos tre interesa. Kaj vere estis. La unua surprizo por mi estis temperaturo. Mi ja alvenis al la malvarma, norda lando, tamen la temperaturo estis + 30-36 gradoj, dum la tuta kongresa semajno.



„Vivanta Naturo, Floranta Kulturo” - tekstis la kongresa temo kaj dume oni ofte povis aŭskulti multajn prelegojn pri finnaj mediprotektaj solvoj kaj finna bela naturo. Finnlando vere estas pura kaj tre zorgas pri ekologio. Ekzemple, en Lahti, oni decidis, ke ekde la jaro 2020 oni tute ne uzos karbon. En televidilo mi ofte vidis reklamojn pri la sunpaneloj. Post pli ol dek tagoj en Finnlando, mi ne miris, kiam mia finna amikino diris, “Mi ne purigis fenestrojn de dek du jaroj”. Mi memoras, ke mi demandis: „Kaj kiam pluvas?” respondo estis: ” Ja pluvo purigos ĝin eĉ pli bone.” Iam tio estis por mi abstraktaĵo. Nun jam ne.

En Lahti, 10 minutoj de la Kongresejo, estas tre belaj lagoj. Unu el ili estas ĉirkaŭita per parko, kun belegaj “muzikantaj fontanoj” aŭ, kiel diras finnoj, „akvaj orgenoj”.



Post la Kongreso, mi pasigis kelkajn tagojn kun mia finna amikino, kiu loĝas en la malgranda vilaĝo, cent kilometrojn nordokcidente de Helsinki, kompreneble, apud lago.

Ŝi montris al mi kelkajn interesajn lokojn, inter alie malnovan urbon Hämeenlinna kun granda fortikaĵo el la 13-a jarcento. Ĝuste en tiu urbo naskiĝis Jean Sibelius (1865-1957), tre fama, konata en la tuta mondo, finna komponisto. Finnoj estas tre fieraj pri li, tre ŝatas kaj konas lian muzikon. En Hämeenlinna, en lia familia domo, nun troviĝas muzeo kaj tute proksime -la bela parko kun monumento omaĝe al la komponisto, ĉe kiu

oni povas sidi sur benkoj, kaj aŭskulti pianajn komponaĵojn, kiuj estis inspiritaj de arboj. Ekzemple, se tio estas melodio pri betuloj, la apudan betulon lumigas lampo kaj vi povas aŭdi „muzikon de betulaj folietoj”. Preskaŭ en ĉiu urbo troviĝas monumento al Sibelius, lian nomon portas muzikhaloj, kaj stratoj.



La ekskurso, kiu plej plaĉis al mi, estis promenado en la nacia parko Torronsuo (trans la marĉo *Torro*). *Suo* - finne signifas marĉo, kaj Finnlando por finnoj ne estas Finna-lando, sed Suomi, do la „lando de marĉoj”. Dum tri, kvar horoj ni marŝis laŭ la malvasta, ligna vojeto kaj ĉirkaŭe ni vidis nur grandan spacon de verda kaj flava herbo kun malaltaj arboj, marĉaj oksikokoj, kaj kelkloke malgrandajn lagetojn kaj ŝlimakvojn. Ĉijare, tiu marĉo ne estas tre kota, pro la nekutima, jam dujara sekeco. En tiu parto de Finnlando, parto de grandaj lagoj kaj altaj arboj, tiu Torronsuo ŝajnis por mi speciale interesa.

Kompreneble, mi vizitis ankaŭ Helsinki kaj Turku - la nuntempan kaj la iaman ĉefurbojn de Finnlando. En Helsinki tre interesa estas altiĝanta super la urbo, la blanka, luterana katedralo - unu el simboloj de la urbo. Alia simbolo, ĉiam vizitata de turistoj, estas monumento al Sibelius, aspektanta kiel tre granda orgeno. Interesa estas la fakto, ke ĉiujn elementojn de la monumento kunligis mem ĝia projektantino - Eila Hiltunen kaj tio daŭris 6 jarojn. Alia interesa konstruaĵo, tute nova, estas



Nacia Biblioteko – donaco de la registaro, malfermita en la jaro 2018, okaze de la festata tiam centjariĝo de sendependeco de Finnlando.

Turku estis la ĉefurbo de la finna princolando, kiam teritorio de Finnlando apartenis al Svedio. La plej interesa tie estas la kastelo el la 13-a jarcento, en kiu loĝis la pola princino Katarzyna Jagiellonka, edzino de Johano Vaza la Tria kaj princino de Finnlando, poste reĝino de Svedio. Tre interesa en tiu urbo estas ankaŭ la subĉiela muzeo, en kiu oni povas vidi, kiel finnoj vivis antaŭ jaroj.

Estis ankaŭ kelkaj interesaĵoj, kiuj iom mirigis min. En kelkaj urboj oni povas trovi monumentojn, kaj preskaŭ en ĉiuj urboj oni povas trovi straton omaĝe al la rusa caro, Akeksandro la Unua, kiu reĝis en Finnlando, kiam en la jaro 1809 la lando komencis aparteni al Rusujo.

En finnaj urboj ĝenerale ne ekzistas tia loko kiel urboplaco. En Finnlando ofte oni trovas simplan placon kun foirbudoj, aŭ granda vendejo.

En urbaj parkoj oni povas fari ĉion: kolekti berojn, tranokti, promeni ĉie, ne nur laŭ turistaj vojetoj, nur oni ne rajtas tie gvidi hundojn sen kondukŝnuro.



Tre populara dolĉaĵo en Finnlando estas „salmiakki”- sala glicirizo, kolorigita per la ligna karbo, - Tial ĉiuj tiuj bonbonoj, kuketoj, glaciaĵoj estas nigraj. Unuafoje en Finnlando mi manĝis nigran glacjaĵon. :-). Finnoj tre ŝatas tiujn dolĉaĵojn, kaj de kelkaj jarojn, novembre, en Helsinki okazas

festivalo de „salmiakki”.

En Finnlando malmultas historiaj antikvaĵoj, riĉaj artaj muzeoj kaj belegaj, malnovaj domoj. Regas tie belega naturo: grandaj, vastaj lagoj, arbaroj kun tre altaj arboj, belaj vilaĝetoj, ĉefe kun lignaj domoj. Kaj tio tre plaĉas al mi.

Mi ankoraŭ ne vidis dum tiu vojaĝo la nordan lumon, nek vizitis Sanktan Nikolaon, kiu loĝas en la norda Finnlando en Rovaniemi, ne grimpis sur la plej altan finnan monton Halti (1324 m.sm.n.) en Laponio. Do mi esperas, ke mi vizitos tiun landon denove.

---

*Krzysztof Blinkiewicz, Gazeta Wyborcza - Płock*

Tradukis: *Robert Kamiński*

## La forgesita esperantisto dormas en trankvilo

Li estis unu el la unuaj, se ne la unua, esperantisto en Płock. Antaŭ sia morto en juna aĝo, li havis tempon vojaĝi al la granda kongreso de Esperanto-entuziasmuloj en belga Antverpeno.

Promenante tra la historia tombejo, mi trovis interesan tomban ŝtonon. Sur ĝi estas teksto, skulptita en iu stranga lingvo - diris al ni loĝantino de Płock Wanda Wierzchowska. Ŝi alportis noton al la redakcio de *Gazeta Wyborcza*, sur kiu ŝi zorge transkribis nekutiman epitafon:

"DORMU EN TRANKVILO,  
EN KVIET' SEN LIM',  
JAM PLU NE SUFEROS  
VIA LA ANIM',  
ĜI AL SUN' SOPIRIS KAJ  
FORFLUGIS FOR'  
DOLOR' NE REVENOS,  
JAM NE PLENDOS KOR'

VIAJ ESPERANTAJ AMIKOJ  
RIPOZU EN ETERNA TRANKVILO  
NIA JUNA AMIKO  
DE LA REDAKCIO  
„POLA ESPERANTISTO”.



La traduko al la pola lingvo troviĝas sur la malantaŭa flanko de la tomboŝtono.

En ĉi tiu tombo estas entombigita Zenon Leopold Ihnatowicz. Tomasz Kordala, la vicdirektoro de Mazovia Muzeo, kiu dediĉis artikolon al li en "*Nasze Korzenie*" ("Niaj Radikoj"), trovis en la dosieroj de la arkivo en Płock tri naskiĝdatojn de Ihnatowicz. La registra enskribo mencias la 25-an de oktobro 1889, lia naskiĝkonfirmilo – la jaron 1892. Sur la epitafio estis ĉizita ankoraŭ alia dato - 1890.

Ekde la infanaĝo Ihnatowicz loĝis en la loĝdomo, apartenanta al la juda komunumo, ĉe la str. Królewiecka 35. Tien, komence de la 90-aj de la 19-a jarcento translokiĝis lia nobeldevena familio. Lia patro estis Wincenty Ihnatowicz - kapitano de la 23-a Niĝ-a Infanteria Regimento kaj kapitano de la stabo de la 21-a Murom-a Infanteriregimento. Zenono estis la plej juna lia filo kaj de lia edzino Waleria Balińska el Płock.

Bedaŭrinde, oni scias malmulte pri la junaĝo de Zenono Ihnatowicz. Li estas konata kiel aktivulo de la Esperanto-movado, ĉefe dank'al la neĉiutaga surskribo sur lia tomboŝtono.

Ni rememoru, ke la lingvo Esperanto estis inventita de Ludwik Zamenhof el Białystok. Ĉi tiu urbo estis en la dua duono de la 19-a jarcento nacia kaldrono. Post diplomiĝo, Zamenhof fariĝis okulisto en Varsovio, kaj en decembro 1885 li venis al Płock, por malfermi sian kabineton. Tamen li ne havis tie multajn pacientojn, do post duonjaro li revenis al Varsovio, kie li baldaŭ finis kaj disvolvis la universalan lingvon Esperanto, konatan en la tuta mondo. Zamenhof mortis en la jaro 1917.

La vojoj de Ihnatowicz kaj Zamenhof en Płock ne povis enplektiĝi, sed eble ili renkontiĝis en 1911, dum unu el la unuaj ĉiujaraj kongresoj, organizataj de la formiĝinta tri jarojn pli frue, Universala Esperanto-Asocio? Oni scias, danke al la menciita revuo "Pola Esperantisto", ke Zenon Ihnatowicz estis delegito al la Kongreso en la belga Antverpeno. Junulo el Płock diskutis tie en kaj pri Esperanto, kune kun ĉirkaŭ 1800 homoj el la tuta mondo. Reveninte al Pollando, li mortis. Li estis entombigita en la urba tombejo, ĉe al. Kobyliński, malpli ol 22-jara. Li forpasis la 6-an de majo 1911, en nekonataj, por nuntempuloj cirkonstancoj.

Lia sabloŝtona tombmonumento nun estas en fatala stato. Apud ĝi kreskis arbo, kies radikoj kreas pli ol centjaran tombon. Ili kaŭzis, ke la tombo kliniĝis kaj montris al preterpasantoj brikan internan parton. Por ke la tombo ne falu, ĝi estis ligita al la arbo per metala ŝnuro. De la tombotabulo iu fortiris krucon. Apude, ankoraŭ antaŭ iom da tempo, kuŝis la tombotabulo de patro de Z. Ihnatowicz, kiu bedaŭrinde ne plu troveblas.

Jen la artikolo pri Zenon Ichnatowicz, kiu aperis en *Pola Esperantisto* en 1911.

“La 6-an de majo foriris el niaj vicoj en la alian mondon juna, 21-jara, fervora samideano Zenon Ichnatowicz el Płock.

Falĉilo de morto subtranĉis la junan vivon; tamen la morto estis kompata kvietigo por ĉi tiu malfeliĉa junulo, kiu de la frua juna aĝo estis minacita de blindeco kaj de du jaroj li suferis terurajn kapdolorojn pro absceso en la cerbo.

Malgraŭ tia kompatinda stato de la sano, Ichnatowicz adoris nian karan ideon, kiu fariĝis lia viv-idealo, lia amataĵo.

Estante tre kapabla, li rapide eklernis Esperanton kaj konis ĝin perfekte, kion pruvis la traduko de noveleto „*Pro la Reĝino*”, presita en „P.E.” (Nr 7-8/1909).

Vere kortuŝaj estas linioj el la letero de lia patrino:

*„Esperantan steleton mi alpinglis al la vesto de l'mortinto, Esperantajn poŝtkartojn kaj delegitan karton de U.E.A. mi metis en la ĉerkon, ĉar la filo petis min pri tio antaŭ la morto; ĉi tio estis liaj trezoroj.*

*La lasta deziro de mia mortinta sola filo estis havi Esperantan surskribon sur la tombo...”*

Al la respektinda patrino de la mortinta samideano ni esprimas nian kor-profundan bedaŭron kaj kondolencon.

Ripozu en eterna trankvilo nia juna amiko!”



## La unua Esperanta turneo: Diversaj nacioj kaj kulturoj, sed nur unu komuna lingvo Esperanto

Pasintjare septembre, dum la komuna veturado al Złotoryja, por prezenti en mezlernejo Esperanton, ekestis nia ideo rekomendi Esperanton en diversaj landoj pere de programo, kiu estos prezentata fare de eksterlandanoj nur esperantlingve, kun traduko en la lokan lingvon. Ni deziris montri, ke por viziti diversajn landojn kaj ekkoni iliajn kulturon, historion kaj homojn sufiĉas koni nur Esperanton.

Post kelkmonataj preparoj, venkinte multajn malfacilaĵojn, ni komencis realigi nian programon ĉi-jare. Ĝi komenciĝis la 4-an kaj finiĝis la 12-an de junio. La unua etapo estis Herzberg am Harz, la Esperanto-Urbo, en Germanio, kaj la dua etapo estis Fleury-les-Aubrais en Francio. Ni preparis abundan programon kun muziko, dancoj, prelegon pri Malsupra Silezio, ĉefe pri ĝia ĉefurbo - Wrocław, kaj ankaŭ polan manĝaĵon. Pro tio la partoprenontoj, kiuj ankoraŭ ne konis Esperanton, intense lernis ĝin kaj penis konstrui konvenan scenejan programon.

La ideo de nia turneo estis ne nur renkontiĝi kun lokaj esperantistoj, ĉar ne temis pri klasika E-aranĝo, sed praktike prezenti utiligon de Esperanto al larĝa publiko: vidigi kaj aŭdigi Esperanton, prui al neesperantistoj, ke nia internacia lingvo vere funkcias, ke konante ĝin, ni facile interkompreniĝas kun homoj el diversaj landoj, sen koni ilian lingvon.

La vojaĝgrupo estis diversaĝa (gejunuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj) kaj konsistis el personoj, loĝantaj en Lubin, Wrocław kaj Góra (malsuprasileziaj urboj, en kiuj aktivis esperantistoj). La organizanto - Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, sukcesis ricevi monsubtenon de: la prezidento de Wrocław, de "Fondaĵo KGHM Polska Miedź", kaj de francaj esperantistoj.

Por komenco, ni elektis la germanan urbon Herzberg, ĉar ni ne sukcesis prepari nian restadon kaj prezenti nian programon en alia germana urbo. Tamen, la elekto montriĝis ĝusta, kvankam la distanco inter Herzberg kaj la sekvonta nia celo - Fleury-les-Aubrais estis tre granda. Nian programon ni prezentis en la granda salono de la bela hotelo *Zum Pass* en Herzberg-Sieber, kie ni ankaŭ loĝis. Nia alveno al Herzberg estis preskaŭ lastmomente interkonsentita kun la lokaj esperantistoj, do ne estis multe da tempo por prepari grandan reklamon en la regiono. Malgraŭ tio, la hotelsalono estis

plenplena. Plenigis ĝin ĉefe la geamikoj de Małgorzata Komarnicka, kiu antaŭ 10 jaroj pasigis en Herzberg 10 monatojn, kadre de Grundtvig-Asistanteco. La geamikoj invitis siajn familianojn, konatojn kaj najbarojn, por rigardi la polan programon en Esperanto, kun traduko en la germanan. La reprezentantoj de la lokaj esperantistoj - Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, invitis la urbestron de Herzberg, s-ron Lutz Peters, kiu amuziĝis ĝis la fino de la programo. La publiko admiris dancojn de la dancgrupo *Gracje*, la majstran gitarludon, pol- kaj esperantlingvan kantadon de la blindulo Wojtek Ławnikowicz kaj la gejunulojn el Góra, kiuj dum nur unu monato kreis la muzikgrupon *Na-Raz* kaj ellernis multajn E-kantojn. Dank' al la prelego de M. Komarnicka, multaj personoj decidis viziti Malsupran Silezion kaj ĝian ĉefurbon Wrocław. La publiko havis ankaŭ eblon admiri diversajn manlaboraĵojn, kiujn preparis Bożena Zajączkowska el la eluzita papero, plastaj boteloj kaj plantoj. Je la fino de la programo la publiko estis regalita per la tipa pola manĝaĵo, pri kiu zorgis Ryszard Komarnicki kaj Teresa Sybilak, kaj invitita al komuna dancado kaj kantado.



Al Francio ni alvenis vespere, la 6-an de junio. Ni estis bele salutitaj de la urbo-estraro en la urbodomo, sed, bedaŭrinde, tuj estiĝis problemoj, kaŭzitaj de neatendita manko de gastigantoj. Tial la divido de la alvenintoj inter lastmomente trovitaj personoj, emaj gastigi la alvenintojn, kaŭzis daŭrajn malfacilaĵojn - ni ekloĝis en lokoj tre foraj unu de alia kaj ni estis gastigitaj de homoj tre favoraj al ni, sed nekonantaj Esperanton.

La sekvan tagon la lokaj esperantistaj organizantoj ne alvenis ĝustatempe al la urba biblioteko, por helpi prepari la prezenton de nia programo. Malgraŭ tio ni sukcesis. Małgorzata prezentis lumbildojn pri Wrocław kaj Malsupra Silezio kun la lerta traduko de Feliks Wandervogel. La loka publiko vere interesiĝis pri

tiu prezentado. Sian arton montris ankaŭ la dancistinoj, la muzikgrupoj. Wojtek entuziasmigis la aŭskultantaron per sia profesia kantnivelo. Božena ĉifoje prezentis bildojn el sekigitaj eroj de plantoj, nomataj pollingve *lišciaki* (foliaĵoj). La publiko, dank' al Ryszard kaj Teresa, estis regalita per la pola manĝaĵo. Je la fino la franca publiko kaj poloj kune dancis kaj amuziĝis.

Poste, bedaŭrinde, estiĝis alia problemo: la urbo-estraro iom "preteratentis" nian viziton. Dum la sabata muzikfesto en la urba parko, ni devis akre barakti ĝis la lasta minuto, por ke niaj muzikistoj kaj dancistoj povu aliri la scenejon kaj prezenti sian programon *nur dum kelkaj minutoj*. Tial la publiko ne povis aŭskulti la belegan voĉon de nia kantisto Wojtek, ĉar iu nedifinita organizanto ne konsentis enskribi lin en sian liston. Tiuj malfacilaĵoj ne devas tamen pensigi, ke nia programo fiaskis. Kontraŭe, la dancgrupo *Gracje* kaj la muzikgrupo *Na-Raz*, eĉ dum siaj kelkaj minutoj, mirigis la publikon. Tiuj altkvalitaj minutoj forte impresis la kolektiĝintajn en la parko homojn, kiuj komencis ĝoje amuziĝi, dancante, kaj eĉ provante kanti la refrenon, kion ili ne faris dum aliaj prezentadoj.

Kvankam ankaŭ la vetero ne favoris nin, dum la sabata festo en la parko, Božena trovis apud sia budo floremulojn kaj recikligemulojn - infanojn kaj iliajn gepatrojn. Krome, ni ne forgesis pri la pola kuirarto, ĉar polaj dolĉaĵoj, kolbasoj kaj la pola supo *żurek* ĉie bongustegas al la publiko!

Pro la pluva vetero, ne okazis dimanĉa muzikfesto en la parko. Tamen, ni renkontiĝis en la urbodomo kun la urbestrino de Fleury-les-Aubrais. Ŝi dankis al ni pro nia alveno kaj belega programo, kaj M. Komaricka reprezentanto de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado dankis, ĉefe pro la eksterordinara gastamo de la francaj familioj, kiuj ne konante Esperanton klopodis krei vere amikan etoson. Wojtek zorgis pri muzika elemento dum tiu renkontiĝo, kantante E-kantojn.

La plej belaj kaj neforgeseblaj momentoj okazis dum nia vizito en bazlernejo, kie Božena okupiĝis pri infanoj kaj montris al ili, kiel komponi artaĵojn el sekigitaj floroj. Wojtek gitarludis kaj Małgosia, Teresa, Ryszard, Jola kaj la interpretanto Feliks helpis al Božena. Multe da partoprenantoj dum tiu laborsesio vere ekinteresiĝis kaj certe plue trejniĝos. Ĉar ĉiuj infanoj ne povis samtempe partopreni en la laborsesio, alia grupo dancis kun nia muzikgrupo. Bela tago, bela etoso dank' al la amika partopreno de la lokaj gelernejestroj, instruistinoj kaj... kuiristinoj, kiuj preparis tagmanĝon por ni.

Nian dankon meritas



ankaŭ la poldevena grupo de Orléans, “Loire-Vistule”, kiu gvidis nin tra la mezepoka kvartalo de sia urbo kaj havigis al ni interpretistinojn. Dum la adiaŭa vespero en la kastelo „La Brossette”, ĉe bongusta manĝaĵo kaj kantoj de la muzikgrupo *Na-Raz* kaj Wojtek, ni longe amuziĝis, rememorante nur pozitivajn momentojn de nia restado. Ni bele dankis al ĉiuj (11 personoj), kiuj okupiĝis pri la preparado de nia alveno kaj restado, per valoraj donacoj.

Ni revenis hejmen kun novaj spertoj kaj amikecoj. Rig. [www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl)

## Pri kio ni aŭdas

GeekWeek.pl

Tradukis: *Robert Kamiński*

### Reveno al la “Arĝenta Globo” - ĝi ŝajnas esti interesa kaj realigebla

La Usona Spaca Agentejo (NASA) intense prepariĝas por reveno al la Luno. La astronautoj planas surluniĝi en 2024. En la programo Artemida. partoprenos ankaŭ kelkaj privataj kompanioj. Unu el ili estos la firmao SpaceX, posedata de Elon Musk. NASA jam mendis ĉe Boeing 6 kapsulojn Orion, danke al kiuj usonaj astronautoj povos flugi sur la ferdekon de la Internacia Spaca Stacio, flugi ĉirkaŭ la Luno, kaj eĉ vojaĝi al aliaj planedoj.

La agentejo konstruas ankaŭ potencon raketon, nomata Space Launch

System. Laŭ la plej novaj informoj, ĝi povas esti preta en 2021. Tiam, kune kun la kosmoŝipo Orion, povos okazi misio al la kosma domo, poste ĉirkaŭ la natura satelito de nia planedo, kaj fine, en 2024, surluniĝo.

Revenante al la temo pri la partopreno de SpaceX en la misio, meritas scii ke NASA anoncis, ke por la reveno al la lunprogramo oni





bezonos uzi 4 raketojn. Unu el ili estos SLS, kaj la aliaj tri apartenos al privataj kompanioj. Estas preskaŭ certe, ke unu el ili estos la raketo Falcon Heavy. (PE 4/2019) Ĝia tasko estos lanĉi unu el la moduloj de la luna surlunigilo, kiu estos muntita jam en orbito.

Dume, la raketo Space Launch System mem portos astronautojn en spacon en la kapsulo Orion. Post kiam ili estos tie, ili transiros de la kapsulo al la surlunigilo kaj ekveturos en pluan, danĝeran vojaĝon.

Reveno al la Luno, laŭ la NASA-ideo, kaŭzas multajn polemikojn. Uzi kvar raketojn pliigas eblojn de problemoj. Tamen, ili povas esti solvitaj per uzo de unu raketo, kiu sen problemo povas porti tiajn pezajn ŝarĝojn kaj ĝuste tia konstruiĝas en SpaceX. Temas pri SuperHeavy-Starship.

Kiel fine aspektos la reveno al la Luno, ni vidos post 2 jaroj, kiam ĉio jam estos aranĝita. Unu afero certas jam nun – usonanoj, dum la 20-aj jaroj, ne nur revenos al la Arĝenta Globo, sed ankaŭ ili estos la unuaj, kiuj faros tion en la 21-a jarcento. Krom usonanoj, por flugi al la Luno prepariĝas ankaŭ ĉinoj kaj hindoj.

Fonto: GeekWeek.pl

---

GeekWeek.pl

Tradukis: *Robert Kamiński*

## Mirinda vojaĝo trans la Norda Poluso per la plej granda aerŝipo en la mondo

*Aerŝipo Airlander 10* estas bonega pruvo, ke aerostatoj/zepelinoj, kiuj ŝajne devis esti la ĉefa transportilo de aera transporto post la dua mondmilito, revenas al favoro kaj baldaŭ fariĝos populara formo de luksa vojaĝo.

La firmao *Hybrid Air Vehicles*, kun sidejo en Britujo, dum jaroj faras lastajn aerajn provojn de sia maŝino, nomata *Airlander 10*. Nuntempe ĝi estas la plej granda fluganta aviadilo en la mondo. Ĝia longeco estas ĝis 91 metroj (Airbus A380 estas 73 metra).

La britoj opinias, ke la posteulo de *Airlander 10* revolucios la aviadon. La maŝino ebligas nekutime luksajn vojaĝojn, same kiel okazis per la fama, germana zepelino, nomata Hindenburg. Tamen, diference de ĝi, ili devas esti tute sekuraj.



Antaŭ kelkaj monatoj, *DesignQ*, la “startigo”\* prezentis la plej lastajn projektojn. La kajuto estas ege luksa, kaj 19 pasaĝeroj de la maŝino povos admiri surfacon de la Tero en eksterordinara maniero, neatingebla aliloke.

Nun, la sveda firmao OpenSky komencis la unuan rezervon de biletoj, por la unua flugo per ĉi tiu eksterordinara maŝino. La ĉiela vojaĝo daŭros 30 horojn, dum kiuj *Airlander X*, kune kun pasaĝeroj, ekvojaĝos el unu el la norvegaj urboj, flugos super la polusaj regionoj kaj poste surterigos ĉe la norda poluso. Pasaĝeroj povos eliri el la aerŝipo sur la maran glaciaĵon.



La maŝino estos plenigita per heliomo kaj kvar 8-cilindraj motoroj kun kapacito de 4 litroj kaj 325 ĉevalpovo, kiuj respondecos pri la veturado. *Airlander X* povos akceli ĝis 150 km/h kaj teni ĝin en la aero ĝis 3 tagoj. Hybrid Air Vehicles planas konstrui tutan floton de tiaj aerumaj ŝipoj kaj komenci komercajn flugojn post 2 jaroj. La biletprezoj nun ankoraŭ ne estas konataj, ebligita estas nur rezervado.

Krom la britoj, pri la aerostatoj tre interesiĝas ankaŭ unu el kunfondintoj de Google - Sergey Brin.

\* (angle - startup) provizora organizo aŭ nova, entrepreno, serĉanta komercan modelon, kiu provizus ĝin per profita kresko. Fonto: GeekWeek.pl/OpenSky / Fot. DesignQ/Hybrid Air Vehicles

## Vizitindaj lokoj

*Weronika Skupin*

Tradukis: Robert Kamiński

### Parkoj de Stela Ĉielo - unu el la plej malhelaj lokoj en Eŭropo, de kie vi vidos 7.000 stelojn

Parko de Stela Ĉielo estas la loko, kie estas tre mallume, pro manko de artefarita lumigado, pro la granda distanco de urboj aŭ eĉ de lumigitaj vojoj. En la kompleta mallumo, pli facile estas observi stelojn. Oni povas aliĝi al organizitaj prezentaĵoj en la plej malhelaj lokoj en Pollando.



La montoj *Bieszczady* nokte estas ideala loko por observi la ĉielon. Foto Shutterstock

## Du Parkoj de Stela Ĉielo en Pollando

En Pollando estas du Parkoj de Stela Ĉielo. En 2009, oni fondis la unuan en Pollando kaj la unuan en la Mondo, en montaro Sudety. Ĝi okupas ĉirkaŭ 7500 ha kaj poloj dividas ĝin kun ĉeĥoj. La dua estas Parko de Stela Ĉielo "Bieszczady", kreita en 2013, en Lutowiska. Tiu ĉi okupas la areon de la Nacia Parko Bieszczady kaj de du pejzaĝaj parkoj: *Cisniańsko-Wetliński* kaj *Dolina Sanu*. La tuto okupas 113.846 ha kaj estas la dua laŭ l grandeco en Eŭropo, post la britaj *Brecon kaj Beacons*. Se oni kalkulus kune kun la najbara Parko de Malhela Ĉielo "*Połoniny*" en Slovakio, la areo estus 162.365 ha.



Montaro *Bieszczady* estas bonega loko por spekti la noktan ĉielon. Foto Pixabay

## Luma poluado

Maloŭte oni scias, ke inter la naturpoluado, kaŭzita de homoj, estas ankaŭ poluado, kaŭzita de artefarita lumo

Artefarita lumo estas emisiata de urboj, loĝkonstruaĵoj, fabrikoj kaj eĉ de ĉevoja lumigado. Ĉi tio influas, inter aliaj, la konduton de bestoj, kiuj pro la luma poluado eskapas de siaj naturaj vivejoj. Grava estas ŝirmado de areoj, kiuj estas nature malhelaj. Plej malmulte da lumo en la mondo troviĝas super oceanoj, Antarkto kaj dezertoj. En Pollando ĉi tiuj areoj estas grandaj arbaroj, kiel naciaj kaj pejzaĝaj parkoj.



## Spektakloj

La stelaj ĉielparkoj ne nur protektas naturajn vivejojn kontraŭ la luma poluado kaj servas por disvastigi sciojn pri la temo, sed ankaŭ estas bonegaj lokoj por observi la ĉielon. La astronomiaj spektakloj okazas en Bieszczady-parko ĉiun sennuban nokton, ĝis la fino de oktobro. Onidire, de tie, en perfekta vetero, eblas propraokule vidi sur la ĉielo eĉ 7000 stelojn!

Ferioj estas la plej bona tempo por spekti perseidojn. Krome, la prezentado inkluzivas observadon de galaksio Lakta Vojo, de la Luno kaj de planedoj. La Lakta Vojo estas klare videbla en la Parko de Malhela Ĉielo "Bieszczady" post noktomezo. La spektakloj okazas ĉe la Intermonto Wyzna, kie estas ebla uzo de teleskopoj. Oni tie povas ankaŭ foti sin por memoro.

## Homoj

*Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 830*

### Forpasis Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof (1925-2019)

**Louis-Christophe (Ludoviko Kristoforo) ZALESKI-ZAMENHOF** (naskiĝis la 23-an de januaro 1925 en Varsovio, mortis la 9-an de oktobro 2019 en Parizo) estis doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, aparte pri premŝtalbetono, nepo de L. L. Zamenhof. Li estis filo

de Adam Zamenhof kaj Wanda Zamenhof, naskita Frenkiel; la personan nomon li ricevis honore al sia avo, Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Li estis Honora Membro de UEA.



Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof dum la UK en Bjalistoko 2009

Li studis en Varsovia Politekniko dum 1946-1949 kaj diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado, sekve doktoriĝis pri teknologio de streĉbetono. En 1959 li translokiĝis al Parizo kaj daŭrigis sian profesionan karieron en Francio kaj aliaj landoj, realigante konstruaĵojn sur tero kaj maroj. Lia alia kampo de laboro estis didaktiko en la Arkitektura Altlernejo en Parizo kaj Politekniko de Milano. Li publikigis multajn artikolojn kaj librojn pri sia fako. Post la emeritiĝo en 1993, li okupiĝis pri faka konsultado, ĉeestis sciencajn konferencojn kaj kongresojn, ankaŭ Esperanto-kongresojn. Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof edziĝis en 1949 kun Krystyna Tyszka, kiu naskis du filinojn: Hanna (1953) kaj Margaret (1958). Li havis nepinon Klementina Zamenhof-Zaruski kaj nepon Pierre-Louis-Antoine Lebard.

Li loĝis en Parizo kun la edzino Juliette, naskita Sekrecka. Li parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan. Li havis la francan kaj polan civitanecojn, estis honora urbano de Bjalistoko.

En 1934 Ludoviko esprimis la deziron partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Liaj gepatroj asertis, ke partopreni en Esperanta kongreso, sen koni tiun ĉi lingvon mistrafigas la celon. La filo helpata de siaj onkloj Zofia Zamenhof kaj Lidia Zamenhof entuziasme eklernis kaj ekposedis flue la lingvon internacian. Tiel komenciĝis lia nova rolo de la „eta princo” dum laŭvicaj Esperantaj kongresoj. Li iĝis objekto de interesiĝo por la kongresanaro: en Stokholmo – 1934, en Romo – 1935, en Vieno – 1936 kaj en Varsovio – 1937, kie li nome de la familio Zamenhof, salutis la kongresanojn. Septembre 1939 la germanaj aviadiloj bombardis Varsovion. La domo ĉe la Królewska-strato 41, en kiu loĝis la familio Zamenhof, estis komplete detruita. Tiam Ludoviko estis nur 14-jara knabo.

En la lasta fazo de sia longa inĝeniera kariero d-ro Zaleski-Zamenhof montriĝis pioniro de streĉbretona konstruado de platformoj, por ĉerpi petrolon de sub la marfundo. Multajn jarojn li lekciis pri la teorio de konstruado en la Arkitektura Altlernejo en Parizo. Li estis ankaŭ kontrakta profesoro en Politekniko de Milano pri markonstruado el streĉita betono, krome lekciis de tempo al tempo pri la sama studobjekto en pluraj landoj, interalie en polaj politeknikoj en Gdańsk kaj Bjalistoko. Louis Christophe Zaleski-Zamenhof emeritiĝis 1993, sed li plu disponigis laŭbezone sian scion kaj sperton kiel konsultisto.

En 1987 Varsovio, kiel „lulilo de Esperanto”, estis ĝusta loko por celebri la centjaran jubileon de la lingvo internacia. La 72-a Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Pollando evidentiĝis la plej granda en la historio de la movado. Ĝi allogis 6 mil partoprenantojn, sen kalkuli proksimume unu milon da gastoj, kiuj alvenis sen la formala aliĝo el Sovet-Unio kaj el aliaj t.n. socialismaj landoj. La direktoro de UEA, Simo Milojević, sukcesis trovi en diversaj landoj de la mondo sep membrojn de la Zamenhofa familio, kiuj alvenis kiel honoraj gastoj, inter ili Louis Christophe Zaleski-Zamenhof kun la edzino Juliette. Li, kiel la nepo de la kreinto de Esperanto, varsoviano kaj monde renoma konstruisto de „artefaritaj insuloj” sur maroj kaj oceanoj, montriĝis aparta atrakcio por ĵurnalistoj, sed ankaŭ por la kongresanoj.

Louis C. Zaleski-Zamenhof, reaperinte en la movado post dudekjara paŭzo, jam firme restis en ĝi. Li engaĝiĝis en la popularigon de la lingvo internacia kaj ĝia ideo per siaj intervjuoj por amaskomunikiloj. Li ankaŭ renkontiĝadis kun esperantistoj, kion respegulas la filmo aperinta en la Pola Televido s.t. „Śladami Dziadka” (Spuroj de la Avo). En ĝi la nepo estas montrita en kelkaj lokoj, ligitaj kun lia avo Ludoviko Zamenhof.

Bjalistoko iĝis ofta vizitcelo de L.C. Zaleski-Zamenhof. En la jaro 2000 li akceptis simbolan diplomon pro la fakto, ke lia avo Ludoviko Zamenhof gajnis la unuan lokon en la plebiscito por „Bjalistokano de la 20-a jarcento”. En la jaro 2007 li estis nomita honora urbano de Bjalistoko apud 14 aliaj distingitoj, inkluzive de Józef Piłsudski kaj Lech Wałęsa. Li plurfoje vizitis Bjalistokon kiel membro de la Fondumo Zamenhof, respondeca pri la konstruo de Zamenhof-Centro.

Pli da informoj legu en la teksto de Roman Dobrzyński, aperigita en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe\\_Zaleski-Zamenhof](https://eo.wikipedia.org/wiki/Louis-Christophe_Zaleski-Zamenhof)

Ĉiu Gazetara Komunikado de UEA estas libere uzbla laŭ la Permesilo CC BY 4.0.

Trovu antaŭajn Gazetarajn Komunikadojn en la retejo de UEA: [uea.org/aktuale/komunikoj](http://uea.org/aktuale/komunikoj)

*[www.bialystok.pl](http://www.bialystok.pl)*

Reprezentantoj de la Urba Oficejo de Bjalistoko, estrita de la vicprezidento Przemysław Tuchlinski, partoprenis en la funebraj ceremonioj ĉe la entombigo de Ludwik Krzysztof Zaleski-Zamenhof, la Honora Civitano de Bjalistoko, kiuj okazis la 17-an de oktobro en Parizo.

(Red)

---

*Roman Dobrzyński*

## Rememore pri Ludoviko K. Zaleski-Zamenhof

Kun la nepo de la kreinto de Esperanto mi konatiĝis en la jaro 1987, dum la 72-a Universala Kongreso de Esperanto, okazigita en Varsovio por soleni la centjaran jubileo de la lingvo internacia. Poste ni plurfoje renkontiĝis, ĉar d-ro Zaleski-Zamenhof de tempo al tempo vizitis Varsovion pro siaj profesiaj taskoj. En la jaro 1992 invitis nin eksprezidanto de la pola parlamento, Roman Malinowski, kiu - kiel honora protektanto de la jubilea E-kongreso - multe kontribuis al ĝia sukceso. Li akceptis nin en sia hejmo kaj montris ĵus eldonitan libron, kiu dokumentis lian rolon en eventoj de la tiama bunta periodo de politikaj transformiĝoj. Dum la nepo foliumis la libron, la dommastro instigis lin priskribi sian vivon, ĉar nur en la duobla nomo Zaleski-Zamenhof kumuliĝas tiom da travivaĵoj, ke ili sufiĉus por



kelkaj biografioj. Sed la nepo de Ludoviko Zamenhof refutis tiun ĉi ideon. Li ne volis tuŝi la traŭmojn de la milita tempo. Tamen, dum nia sekva renkontiĝo en Varsovio, li menciis, ke eble estus utile, se liaj vivospertoj ne restu kaŝitaj.



Aŭtune 1993, ni kunveturis al la litova kuraĉloko Druskininkai, kie li infanaĝe kelkfoje feris kun siaj gepatroj. Estis kroma motivo; proksime situas la **vilaĝo Veisiejai**, kie juna Ludoviko Zamenhof unuafoje praktikis sian kuracistan profesion kaj samtempe finpretigis la „unuan libron”. La vizito al Veisiejai sendube instigis d-ron L.C. Zaleski-Zamenhof paroli pri sia biografio. Mi demandis, kion li konsideras sia plej granda vivsukceso, kaj li respondis ŝerce: *Tion, ke mi estas samtempe avo kaj nepo; la avo en mia propra familio*

*kaj la nepo en la esperantista granda rondo familia.* La interparolo, komenciĝinta en Litovio, daŭris ok jarojn. Tio ne estis kutima intervjuo. Ni babilis pri diversaj temoj. Mi notis faktojn, datojn, nomojn, anekdotojn, kiuj ŝajnis al mi interesaj. Kelkfoje ni vojaĝis kune, partoprenis aranĝojn, dum kiuj d-ro Zaleski-Zamenhof parolis publike aŭ private en amikaj rondoj. Ankaŭ tio estis por mi notinda. Surbaze de tiel kolektita materialo, riĉigita per propraj observoj kaj scio, komenciĝis la verkado de libro en la pola lingvo. Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof, konata en Esperantujo kiel la nepo de la kreinto de lingvo internacia, estis en si mem eminenta Zamenhofo: inĝeniero, konstruanto de artefaritaj insuloj, intelektulo, humanisto kaj samtempe ĉarma, humorplena persono. La verkado okazis peco post peco; ĉiujn partojn Zaleski-Zamenhof persone aŭtorizis.

La bona akcepto de tiu ĉi pollingva, la unua biografio pri la nepo de Zamenhof tentis reverki ĝin en Esperanton. Ĝi aperis en Litovio s.t. „La Zamenhof-strato”, kaj estis lanĉita dum la Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo (Svedujo 2003). La lanĉon ĉeestis la protagonisto de la verko mem. Surprize por mi oni komencis ĝin traduki el Esperanto en diversajn lingvojn. Unue ĝi aperis en la litova, poste japana, portugala, kroata, slovena, slovaka, ĉeĥa, estona, hungara, franca, itala, germana kaj

hispana lingvoj. Baldaŭ ekaperos la ĉina versio. La spontana tradukado de „La Zamenhof-strato” estis klarigebla per tio, ke ĝi montriĝis dokumento pri la nekonata sorto de la familio Zamenhof, dum la dua mondmilito. L.C. Zaleski-Zamenhof la unuan fojon malkovris gravajn faktojn kaj korektis misinformojn, mitojn aŭ falsajn elpenaĵojn pri tiu ĉi temo.



En la jaro 2014 Esperanto estis enskribita en Pollandan Liston de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj. Tiu ĉi senprecedenca ŝtata ago anticipis la rekomendon de UNESCO celebri en la jaro 2017 la centan datrevenon de la morto de Ludoviko Zamenhof. Pro la sama okazo, la pola Nacia Instituto de Kulturheredaĵoj subvenciis la pollingvan eldonon de la libro „Zamenhof en Varsovio”, kiun sekve eldonis Universala Esperanta Asocio en la lingvo

internacia. Tiu ĉi libro, kiu ĉefe koncernis la kreinton de Esperanto, ankaŭ kompletigis la biografion de lia nepo. Temas pri la paroĥa domo apud la katolika preĝejo de Ĉiuj Sanktuloj, kiu troviĝis en la tereno de la geto en Varsovio. L.C. Zaleski-Zamenhof atestis la ofereman konduton de la pastro Marceli Godlewski rilate al getanoj, kiuj vivis en la terura interpremo. Li loĝigis en la konstruaĵoj de sia paroĥejo proksimume 100 personojn, interalie plurajn membrojn de la familio Zamenhof. La eldiroj de la nepo pri tiuj eventoj montriĝis la ĉefa atestaĵo, laŭ kiu Yad Vashem en Jerusalemo atribuis postmorte al la pastro Marceli Godlewski la titolon de *Justulo inter la Popoloj pro la helpo, kiun li faris por judoj, endanĝerigante sian vivon kaj tiun de siaj proksimuloj en Pollando, sub la germana okupacio dum la dua mondmilito.*

Laŭ la cititaj libroj, estis kompilita la konciza biografio „Avo, kiu estas nepo” en la pola kaj Esperanta lingvoj. Ambaŭ broŝuroj estis aŭtorizitaj de d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof. Li ne sentis sin komforte, kiam samideanoj esprimis honorojn al li, kiel la nepo de la kreinto de Esperanto, ĉar tiu ĉi fakto ne estas lia merito. Li ankaŭ miris, ke intervjuantojn interesis ĉefe lia

estado en la geto. Jes, tio estis terura tempo, kiu daŭris unu jaron kaj duonon. Sed poste pasis jardekoj, dum kiuj li mem direktis sian vivon. Li ne sekvis la medicinan profesion de siaj familianoj, sed fariĝis konstruinĝeniero kaj atingis sur tiu ĉi kampo sukcesojn je la monda skalo.

Kia estis la kialo de lia duobla nomo? Eskapinte el la geto aŭguste 1942, li akiris de la sekreta armeo de okupita Pollando la falsan personan dokumenton je la nomo Krzysztof Zaleski. Sub tiu ĉi fikcia identeco li senkaŝe vivis, laboris kaj sekrete agis en la kontarŭgermana rezisto. Kiam finiĝis la milito, li revenis al sia originala nomo, sed ne forlasis la fikcian pseŭdonimom, pro la jena motivo: *Se Zaleski savis Zamenhofon, ne decis, ke Zamenhof forturniĝu de li. Tial mi kunmetis ambaŭ nomojn kiel Ludwik Krzysztof Zaleski-Zamenhof, ĉar mi sentas min unu kaj la alia. La diferencoj en la unueco estas fundamento de la ideo de toleremo, kiun mi akceptis kiel la devizon de mia vivo.*



L.C. Zaleski-Zamenhof respektis la fakton, ke lia avo forcedis por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn je sia lingvo, kaj komprenis, ke tiu decido koncernas ankaŭ liajn here-dantojn.

Margaret Zaleski-Zamenhof kun patro.

En la jaro 1912 Ludoviko Zamenhof retiriĝis de la Esperanto-movado, kaj tiel sugestis al siaj familianoj eviti akceptadon de postenoj en ĝi. Tamen, postrestis la tradicio saluti Universalajn Kongresojn de Esperanto nome de la familio Zamenhof. La nepo, dum ses jardekoj, kun paŭzoj, plenumis tiun ĉi rolon. La lastan fojon li oratoris salute kiel naŭdekjarulo, dum la jubilea 100-a UK en Lille (2015), kaj tie solene transdonis la tradician torĉon al siaj filinoj Hanna Zamenhof-Zaruski kaj Margaret Zaleski-Zamenhof. D-ro Ludoviko Kristoforo (Louis Christoph) Zaleski-Zamenhof forpasis la 9-an de oktobro 2019, en la aĝo de 95 jaroj, sen tri monatoj.

## Posedaj pronomoj

Se oni aldonas la finaĵon A al personaj pronomoj, oni kreas **posedajn pronomojn**:

<i>mia</i>	(la)... de mi
<i>nia</i>	(la)... de ni
<i>via</i>	(la)... de vi
<i>lia</i>	(la)... de li
<i>ŝia</i>	(la)... de ŝi
<i>ĝia</i>	(la)... de ĝi
<i>ilia</i>	(la)... de ili
<i>onia</i>	(la)... de oni
<i>sia</i>	(la)... de si

Teorie ekzistas ankaŭ *cia* = “(la)... de ci”, sed *cia* normale ne estas uzata. Oni uzas *via* kaj unu-nombre kaj multe-nombre.

Krome ekzistas la neoficiala (proponita) poseda pronomo *ria* ≈ “(la)... de ri (de la persono)” (unu-nombra).

La posedaj pronomoj estas difiniloj. Ili enhavas normale la signifon de *la*.

La posedaj pronomoj povas ricevi la finaĵojn I kaj N same kiel aliaj A-vortoj (ĉiam J antaŭ N): *mia ĉambro* – *miaj ĉambroj* – *mian ĉambbron* – *miajn ĉambrojn*.

Noto: Iafoje oni renkontas posedajn pronomojn kun la fino “*es*” anstataŭ A: *\*mies\**, *\*vies\**, *\*lies\**, *\*ilies\** k.t.p. La “*es*”-parto estas pruntita de la tabelvortoj je ES, kiuj ankaŭ estas posedaj. Tiaj posedaj pronomformoj estas neregulaj, sed tamen kompreneblaj. Kiel ŝercajn vortojn oni povus ilin eble iafoje uzi, sed en serioza uzo ili estas nepre evitendaj.

### Signifoj

Poseda pronomo similas al *de* + persona pronomo: *mia* ≈ *(la) de mi*. Sed *de* havas tre multajn signifojn. La posedaj pronomoj havas nur kelkajn el tiuj signifoj:

- La normala signifo de poseda pronomo estas aparteno aŭ posedo: *mia domo* = “la domo posedata de mi, la domo kiu apartenas al mi”, *lia nazo* = “la nazo kiu apartenas al li, la nazo kiu estas parto de li”, *ŝia lernejo* = “la lernejo en kiu ŝi lernas/instruas (aŭ simile)”, *ilia lingvo* = “la lingvo kiun ili parolas”.

- Poseda pronomo povas ankaŭ montri aganton: *lia agado* = “la agado (farata) de li, la agado kiun li faras”. Poseda pronomo povas havi tian signifon nur ĉe aga O-vorto: *lia agado, iliaj klopodoj, via atingo. De* povas havi tian signifon ankaŭ ĉe pasiva participo: *farita de li, amata de mi*.

- Poseda pronomo povas kelkfoje montri sencan objekton: *ĝia uzado* = “la uzado de ĝi, la ago uzi ĝin”. Oni atentu, ke miskomprenoj ne ekestu. Ekz.: *ŝia admirado* normale signifas: “la admirado fare de ŝi” (subjekta signifo). Se oni uzas *ŝia admirado* en la signifo “la ago admiri ŝin” (objekta signifo), oni ne eraras, sed oni eble riskas miskomprenon.

En iaj frazoj pri ies korpoparto, vestaĵo aŭ simile, oni kutimas uzi *al*-komplementon anstataŭ poseda pronomo: *Mi lavis al mi la manojn.* = *Mi lavis miajn manojn.* *Ili disŝirus al si la vestojn.* = *Ili disŝirus siajn vestojn.*

## Literaturaĵoj

*Teresa Nemere*

Strebante ordigi miajn librojn kaj papermemoraĵojn, mi kun ĝojo trovis esperantigitan, laŭ mi tre interesan, groteskon de la konata usona verkisto-humoristo Mark Twain (1835-1910). Bedaŭrinde, mi ne scias, kiu tradukis tiun interesan literaturaĵon. Releginte ĝin post mulaj jaroj, mi rimarkis, ke la satira rigardo al la homo estas ankaŭ hodiaŭ aktuala - ja nun la homo estas eĉ pli „flikata” de medicinistoj kaj diversaj teknikistoj. Do, mi proponis aperigi la groteskon sur la paĝoj de Pola Esperantisto, por ke ni amuziĝu kaj ne estu tro memfidaj.

### „La homo”

La homo ne povas dormi sub libera ĉielo, ĉar tie li malvarmumus ĝis morto aŭ estus prenata de reŭmatismo. Li ne povas teni sian nazon pli longe ol unu minuton sub akvo sen droni. Li estas – permesu tion diri! - la plej mizera kaj plej senhelpa el ĉiuj kreitaĵoj, surloĝantaj la Teron.

Oni devas lin dorloti kaj vindi en tukojn, por ke li komence povu vivi.

Li estas delikata aĵo, vera Brita Muzeo de malperfektaĵoj. Tial li bezonas konstantan riparadon. Maŝinon tiel difektan kiel li, neniun aĉetus.

Ŝajnas, ke la bestoj, malpli altaj, naskas siajn dentojn sen doloro kaj sen malagrablaj sentoj. Sed tiuj de la homo traboras sin post monato de kruelaj torturoj kaj en la tempo, kiam la homo malplej multe estas kapabla elteni tiajn torturojn. Sed kiam li posedas ĉiujn dentojn, jam estas necese eltiri ilin. La dua garnituro ja restas kelkan tempon, sed vere fidindan garnituron nur fine faras dentisto.

Estante infano, la homo komencas esti malsana kaj tio restas lia regula ludo ĝis la fino. Paratidoto, skarlatino, kokluŝo, kataroj, tonsilito kaj difterito estas por li tute naturaj aferoj.


Poste, en la plua paŝo de la vivo, lin ĉiam minacas nazkataro, tuso, astmo, bronkito, influenco, angino, tuberkulozo, blindigo, flava febro, furunkoj, pulinflamo, paralizo kaj mil aliaj malsanoj de tiaj aŭ aliaj specoj.

Li estas korbo plena de pesta putraĵo, azilo kaj manĝejo por mikroboj. Rigardu kelkajn detalojn de tiu ĉi faritaĵo:

Por kio li posedas la cekumon? Ĝi havas neniun valoron. Ĝia unika tasko estas kuŝi en la ventro, atendi iun erarintan vinberkernon kaj poste kaŭzi suferojn.

Por kio servas la barbo de l'homo? Ĝi estas natura ĝenaĵo. Ĉiuj persekutas ĝin per razilo. Sed la naturo ĉiam denove kreskigas ĝin, anstataŭ transigi ĝin sur la kapon de l'homo.

La homo deziras konservi sian kaphararon. Ĝi estas bela ornamo, la plej bona ŝirmilo kontraŭ vetero kaj la homo ĝin ŝatas pli ol smeraldojn kaj rubenojn. Dum la unua duono de la vivo la naturo ja permesas al ĝi kreski, sed ĝi ne emas resti.



La homo eĉ ne estas bela. Rilate al lia korpo – rigardu la bengalan tigron, tiun enkorpiĝon de ĉarmo, korpa perfekteco kaj majesteco!

Rigardu la leonon, la gazelon, la leopardon – kaj poste rigardu la homon – tiun mizeran ulon, tiun animalon kun peruko, aŭdotubo, la vitra okulo, la porcelanaj dentoj, la ligna gambo, la arĝenta trakeo – tiun kreitaĵon, flikitan de sube ĝis la supro!

Mark Twain, 35 aĝa en aprilo 1871

## Poŝkesto



Koran saluton! Mi nomiĝas Luis Rafael, kaj mi estas en malgranda grupo de lernantoj de Esperanto en mia vilago, kiu nomiĝas Cascajal (Kaskajalo) en la provinco Villa Clara Cuba. Mi interesiĝas pri korespondado kun samideano de via lando. Bonvolu disdonu mian retroŝton kaj ankaŭ mian poŝtadreson al aliaj: Luis Rafael Berrios Macario, Vaquerito Norte # 12-A, Cascajal-54490, Villa Clara, Cuba, [luisrafael.berrios@nauta.cu](mailto:luisrafael.berrios@nauta.cu)

## Kalendaro

### Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando kaj en najbaraj landoj en 2019 kaj 2020

7.09. 2019	Nacia Legado en Bjalistoko en Centro Ludoviko Zamenhof	Bjalistoka Esperanta Societo <a href="mailto:kontakt@espero.bialystok.pl">kontakt@espero.bialystok.pl</a>
7.09. 2019	Nacia Legado en Krakovo str. Rajska 1, 16:00 horo	Scienca Studenta Esperanto Rondo de la Jagelona Universitato kaj la Vojevodia Publika Biblioteko en Krakovo.
7.09. 2019	Nacia Legado en Łomża	Henryk Borkowski
7.09. 2019	Nacia Legado en Krakovo Parko Ŵródliŝka, 10 horo	Pola Esperanto-Asocio Filio en Łódź
13-15. 09.2019	Esperanto Sur la Strando - 2019 Gdynia – Sopot, temo: "Najbaroj"	Triurba Esperantista Asocio TORENTO <a href="mailto:torentosopot@wp.pl">torentosopot@wp.pl</a> <a href="https://sites.google.com/site/esperantowso">https://sites.google.com/site/esperantowso</a> pocie/ FB – Esperanto Sopot.pl
14.09. 2019	Festo de la kvartalo Muranów PEA-stando dum sobĉiela festo Skvaro ĉe str. Andersa 13	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio <a href="mailto:alwamo@wp.pl">alwamo@wp.pl</a>

20-22. 09. 2019	35-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2019” en Poznań	E-Senco Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. <a href="http://www.arkones.org/eo/">http://www.arkones.org/eo/</a>
29.09. 2019	„Tago de kreo-povo” PEA-stando en Ogród Saski en Varsovio 11:00-16:00	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio <a href="mailto:alwamo@wp.pl">alwamo@wp.pl</a>
11-13. 10.2019	43-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE <a href="mailto:pomer@wp.pl">pomer@wp.pl</a>
9-11. 11.2019	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 23 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, <a href="mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com">stanislaw.mandrak@gmail.com</a> aŭ: <a href="mailto:staman@ka.onet.pl">staman@ka.onet.pl</a>
6-7. 12.2019	4-a Esperanta konkurso “Vortbeleco en Esperanto” en Wrocław	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado / <a href="mailto:informado.eo@gmail.com">informado.eo@gmail.com</a> / Malgosia Komarnicka
13-15.12. 2019	20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanta Societo <a href="mailto:kontakt@espero.bialystok.pl">kontakt@espero.bialystok.pl</a>
27.12- 3.01 2020	11-a JES Junulara Esperanta Semajno en Karlów	Pola Esperanto-Junularo <a href="http://www.pej.pl">www.pej.pl</a>
25.07- 1.08.2020	93-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda en Bialistoko	Bjalistoka Esperanto-Societo kaj Sennacieca Asocio Tutmonda <a href="https://www.facebook.com/events/649411952208990">https://www.facebook.com/events/649411952208990</a>
1-8.08. 2020.	La 105-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado).	Universala Esperanto-Asocio <a href="http://uea.org">uea.org</a>
17-24.07 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Belfasto (Nord-Irlando).	Universala Esperanto-Asocio <a href="http://uea.org">uea.org</a>

## Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

17-20.10. 2019	Kongreso de Ĉeĥa Esperanto -Asocio en Brno, Ĉeĥio.	Estraro de ĈEA, náměstí Míru 1, 568 02 Svitavy, Ĉeĥio. - retadreso: <a href="mailto:cea@esperanto.cz">cea@esperanto.cz</a>
-------------------	---	--



6-13. 04.2020	36-a Printempa Esperanto Semajno (PSI) 2020 en Wittenberg -Germanio. Granda internacia renkontiĝo por la tuta familio	Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstrasse 25, 10965 Berlin, Germanio.
01-10.05. 2020	"Mirinda Lviv" en Lviv – Ukrainio	Volodimir Hordijenko, Kijivo volodimir@ukr.net
13-21.07. 2020	43-a SEFT Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro en Thomsdorf - Germanio	Vorsitzender Esperanto-Klub Schwerin André Christian Weber, gerd.gallium@mailbox.org
18-26.07. 2020	Somera Esperanto-Studado (SES) kaj Somera Esperanto-Programado (SEP - La dua Esperanta kodummaratono - angle "hackathon") en Kroměříž - Ĉeĥio	E@I, Februárová 2, SK-958 01 Partizánske, Slovakio ses@ikso.net
17-20.09. 2020	2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo en Kassel - Germanio Laborateliere "Esperanto kaj Eŭropo" kadre de "Kleriĝo kaj Lingvoj"	w.guenther.esperanto@web.de

*Inter eksterlandaj Esperanto-renkontiĝoj en 2020 precipe unu ŝajnas esti interesa kaj indas prezenti ĝian priskribon. Jen la informo, kiun preparis organizantoj de „2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo en Kassel” (Red.)*

La temkampoj estos "La Mondo de Laboro", "Hobioj kaj Libertempo", "Kleriĝo kaj Lingvoj", "Familio kaj Junularo", "Religio kaj Etiko", "Politiko kaj Juro", "Sano kaj Socialo", "Sporto, Muziko, Arto".

Malgraŭ la klimatokrizo, la migrantoproblemoj, la Briteliro kaj okupiĝado pri naciaj anstataŭ pri eŭropaj interesoj Eŭropo nun kiel antaŭe estas alianco, portata/apogata de multaj civitanoj - surbaze de laŭeble pacaj kaj demokratiaj principoj kaj aktuale multflanke batalanta kontraŭ la resursa kaj sistema degradigo de la vivmedio sur nia unu komuna Planedo... Eŭropo devas esti Eŭropo de la gecivitanoj.

La Eŭropa Civitana Renkonto seriozas pri ĉi celo kaj volas spertebliĝi Eŭropon por ĉiuj.

La iniciatintoj de la ECR estas plurkampe engaĝiĝantaj geeŭropanoj. La renkonto estas partipolitike, ekonomie kaj religie neŭtrala. Ĝi fariĝu daŭripova platformo por interŝanĝado pri komunaĵoj kaj diferencoj kaj montru, ke diverseco povas esti riĉiĝo por la propra vivo kaj povas bone harmonii kun unueco. La renkonto konsistas el inform- kaj

laboratelieroj pri multaj kulturaj kaj socialaj kampoj/temoj (historio, kleriĝo, lingvoj, juro, homaj rajtoj, demokratio, civitana partoprenado, honoroficeco, sporto, artoj, homaj rajtoj ktp.) kaj ampleksa kromprogramo. Estos laŭbezone interpretistoj.

Estos ateliero pri Esperanto, ties aktualaj perspektivoj, la lingvopolitiko de la EU kaj ekspreslingvokurso. La hejmpaĝoj pli kaj pli ĝisdatigos/plidetaltigos la programon.

Kontakto pri la renkonto: [office@kassel-ebb.eu](mailto:office@kassel-ebb.eu) (Oni povas libere peti informojn kaj ankaŭ jam nun senformulare aliĝi tie. Por eksterlandanoj estos subvencioj por la vojaĝo.)

Kontakto per/pri Esperanto: Wolfgang Günther.

## Oni eldonis

### „Ok noveloj”

ISBN: 978-83-63698-51-5  
la libro estas aĉetebla ĉe BES.  
Prezo: 20 zł.

Eldonis: Bjalistoka  
Esperanto-Societo, Bjalistoko  
2019.




*Henryk Sienkiewicz*

### „La saĥemo”


Tradukis: Maria Majerczak.  
ISBN 978-83-955337-1-6

Eldonejo: Insurreart,  
Kraków 2019.

Broŝuro A5, 11 paĝoj



*Henryk Witkowski*  
**„Pri ETIK-IDEOJ  
DE L.L. ZAMENHOF”**  
ISBN 978-83-930237-0-7  
Eldonis: Esperanto-Societo  
Flamo, Toruń 2018  
Broŝuro, grandeco A5



*Robert Kamiński*

## Pri internacia lingvo en scienca bulteno

En la oktobro de 2019 aperis sekva, jam tria scienca kajero sub titolo "Lingvoinstruado" (pole: Nauczanie języków). La eldonaĵo prezentas artikolojn pri didaktiko de fremdaj lingvoj kies aŭtoroj estas lingvoinstruistoj de Interfakultata Departamento de Fremdaj Lingvoj ĉe Pontifika Universitato Johano Paŭlo la Dua en Krakovo. Inter la artikoloj estas ankaŭ tiu, kiu prezentas la internacian lingvon Esperanto. La titolo estas jena: „Pri instruado de Esperanto: elektitaj metodoj, lernolibroj kaj vortaroj” (pole: O nauczaniu języka esperanto: wybrane metody, podręczniki i słowniki). La aŭtorino Magdalena Tatara celis prezenti por neesperantista publiko, ke Esperanto, kiel aliaj lingvoj prilaboris siajn metodojn kaj lingvohelpilojn. La artikolo koncize prezentas la plej gravajn atingojn de esperantistaj instruistoj kaj didaktikistoj polaj kaj internaciaj.



ISBN 978-83-7438-787-3 – papera versio,  
ISBN 978-83-7438-788-0 – cifereca versio

Robert Kamiński

## Nova esperantlingva turisma prospekto

Turisma Informejo de Łódź, kunlabore kun la Oficejo de la Urbo Łódź, decidis eldoni novan falditan prospekton pri la urbo "Turismaj Atrakcioj". Oni planis publikigi la novan eldonajon en naŭ lingvoj: hispana, itala, rusa, ukraina, ĉeĥa, franca, japana ĉina kaj hebrea.

Esperantistoj el nia urbo sukcese petis aldoni al la projekto la dekan lingvon - Esperanto. Unue oni parolis pri mil ekzempleroj, sed finfine estis presita 3000 prospektoj. PEA, filio en Łódź, devis traduki la enhavon kaj ricevis 2500 ekz. senpage. 500 ekz restis je dispono de Turisma



Informejo. Venante al ĝia sidejo ĉe la str. Piotrkowska 28, turistoj povas trovi ĉiujn dek diverslingvaj prospektojn en speciala prezentilo. Estus bone ĉiam demandi pri esperantlingva prospekto, por ke servistoj de la informejo sciu, ke homoj serĉas kaj bezonas tiun ĉi informilon.

Stando en la Turisma Informejo en Łódź kun prospektoj en dek lingvoj



En ĉiutaga gazeto „Dziennik Bałtycki” la 15-an de septembro 2019 aperis duonpaĝa artikolo de Natalia Grzybowska pri esperantista renkontiĝo “Esperanto sur Strando”. Titolo: “Esperantistoj el Pollando kaj la mondo ekkonas la ĉarmojn de Pomeranio kaj Gdańsk”

10

roĉinnj na Pomorzu

Dziennik Bałtycki  
Sabota nioziela 11 15.09.2019

## Esperantysti z kraju i ze świata poznają uroki Gdańska i Pomorza

**Już po raz siódmy** stowarzyszenie Toronto zorganizowało międzynarodowe spotkanie dla osób władających językiem esperanto. W tym roku zgłębiają kulturę kaszubską i kociewską.

**Gdańsk**

Natalia Grzybowska  
natalia.grzybowska@interia.pl

Esperanto w zamierzeniu miało zjednoczyć miliony ludzi na świecie. Jego twórcą - Polak Ludwik Zamenhof chciał dać ludziom wspólny język, dzięki któremu będą umieli porozumiewać się ponad kulturowymi i wyznaniowymi podziałami. Wierzył, że esperanto stanie się ważnym narzędziem w staraniach o pokój na świecie. Efekty swojej pracy opublikował w 1887 roku.

Dzisiaj, w dużej mierze dzięki internetowi, esperanto wciąż się rozwija, a jego użytkownicy zresztą się w stowarzyszeniach krajowych, kulturowych, tematycznych i w wielość państw świata. Jednym z nich jest Stowarzyszenie Esperantystów Trójmiasta Torontoto, które już po raz siódmy organizuje wrześniowe międzynarodowe spotkanie, podczas którego - w gronie

osób władających tym etnarym językiem - zgłębiają uroki Gdańska, Sopot, Gdyni i okolic.

W ramach inauguracji, dzięki pani Źwiole Gilewskiej z oddziału etnografii Muzeum Narodowego, miłośnicy języka Zamenhoga mogli nabyć wiedzę o kaszubskich i kociewskich tradycjach, kulturowym dorobku i regionalnej tożsamości.

Na kermesach dołączali zebrani mogli podziwiać tradycyjne ludowe instrumenty (dłablaskie skrzypce, burczybusz czy łacunej), ceramikę, drewniane figurki, tabalierki i obrzy na szkie makowane. Wraz z pologentą przesiadali jak w poczęgłonych zabatkach Kaszub zmieniali się buffi oraz w jaki sposób ukulało się odzworzy, wyglądy tradycyjnych strojów i czepcow, które zanikły w drugiej połowie XIX wieku.

Maria Hopkins, która z pochodzenia jest Kaszubką, „na deser” opowiadała o sytuacji lokalnej legendy,



Esperantysti zdobywają wiedzę o kaszubskich i kociewskich tradycjach, kulturowym dorobku i regionalnej tożsamości

przebrałoma oczywście na esperanto. Nie był to jednak koniec atrakcji, bo dla Esperantystów zaplanowano również gry miejską ukazującą wielokulturowy wizerunek Gdańska.

Dojazd czesła ich wzięty w Sopocie, gdzie zgodnie z tra-

dycją stowarzyszenia, wzmaga udział w Paradzie Organizacji Pozarządowych, która przejdzie ulicą Bohaterów Morcia Cassino, aż do Skweru Kuracyjnego, gdzie w samo południe nastąpi uroczysta inauguracja święta pozarządowości. Nie zabraknie też zagadnień

teoretycznych, bo w Dworcu Sierakowskich o języku kaszubskim i literaturze regionu opowie dr Paul Hopkins, lingwista. Krógu naukowe zainteresowania dotyczą języków mniejszości.

Ostatniego dnia esperantysty pomłowa pocciągą

do Pępłina, gdzie zwiedzą lokalne muzeum katedralne. Podczas wizyty na Kociewiu spodzija się z zespołem Modrak, który swoje „Małą Oczyszcz” promuje nie tylko lokalnie, ale też na świecie, już od ponad 20 lat. 6:02



En ĉiutaga gazeto „Życie Kalisza” en urbo Kalisz, la 8-an de novembro 2019 aperis tutpaĝa artikolo de Hubert Mościpan pri prelego de loka Esperantisto Świętosław Fortuna. Li prelegis pri Esperanto en urba arkivo. Titolo de la artikolo: “Świętosław Fortuna rakontis pri Esperanto – lingvo kiu povis unuigi naciojn”

Robert Kamiński

## Forpasis

La 9-an de oktobro 2019 en Antony apud Parizo forpasis doktoro, inĝeniero **Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof**, multjara esperantisto kaj nepo de kreinto de Esperanto. Adiaŭa ceremonio okazis la 17-an de oktobro en familia rondo. En nomo de polaj esperantistoj kun granda doloro informas,  
Robert Kamiński

La 10-an de septembro 2019, en Varsovio forpasis **Irena Łowińska**, multjara esperantistino, membro de PEA kaj fervora agantino de Esperanto-klubo en Varsovio.. La funebra ceremonio okazis merkrede la 18-an de septembro je la 15:05 en kapelo ĉe la tombejo “Wólka Węglowa” ĉe la str. Kazimierza Wóycickiego 14 en Varsovio. En nomo de varsoviaj esperantistoj kun bedaŭro informas,  
Alina Mozer


## El fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

VI-aj Esperantaj Tagoj de  
Krakovo 11-13.12.1987 j.

Karaj legantoj, ĉi-foje mi ne sukcesis trovi programon de la aranĝo. Organizanto estis Pola Esperanto-Asocio, Filio en Krakovo. Bonvolu rigardi nur arkivaj fotografajoj.

Prelegas Leszek Kordylewski



VI-aj E-Tagoj de Krakovo 1987. FOTO A. Sochacki



VI-aj E-Tagoj de Krakovo 1987. FOTO A. Sochacki

## PEJ Kunveno



VI-aj E-Tagoj de Krakovo 1987. FOTO A. Sochacki

Prelegas Stanisław Świstak

Pola Esperantisto 5/2019



VI-aj E-Tagoj de Krakovo 1987. FOTO A. Sochacki

Stanisław Świstak gratulas al opera  
kantistino Wanda Polańska



VI-aj E-Tagoj de Krakovo 1987. FOTO A. Sochacki

Florjaj por Jadwiga Gibczyńska



VI-aj E-Tagoj de Krakovo 1987. FOTO A. Sochacki

Ensemblo „Krajanie” el Kamień Krajeński





Esperantistoj partoprenas en la Nacia Legado en Łomża kaj Łódź



Stando de PEA dum surstrata festo "Urodziny Andersa" en varsovia kvartalo Muranów la 16.09.2019



Renkontiĝo de esperantistoj el Siedlce kaj Varsovio en ĝardeno de Irek

# NIA FOTOGALERIO



Entombiga ceremonio de Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof en Parizo